# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Junio 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 6 (1176)

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

ISSN 1163.0442 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**

# BONVENON AL ĈAŬDEFONO

## urbo de la 76-a Kongreso de S.A.T.



**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*mi devigas min verki tiun ĉi redaktoran komunikon malgraŭ la impreso ke neniu legas ĝin. Ja, regule mi invitas vin helpi al mi en la redaktado de nia Sennaciulo per sendo de viaj kunlaboraĵoj, sed mi ne konstatas ian ajn efikon de tiuj invitoj. Ankaŭ sendu kritikojn, rimarkojn kaj proponojn por ke ni tiel faru kiel eble plej interesan gazeton de la neneŭtrala Esperanto movado. Ni faru ĝin tiel ke en ĝi oni povu legi tion, kion oni ne trovas en aliaj E-gazetoj. Ja, nia avantaĝo estas ke ni povas trakti la temojn kiujn la organoj de neŭtralaj E-asocioj laŭstatute ne povas.*
*Do libere esprimiĝu, ĉar ĉe SAT ne ekzistas tabuoj.*
*Esperante ke ĉifoje mia alvoko ne estos vana, mi plej kamaradece salutas vin,*

*via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

## ATENTIGO AL NIAJ MEMBROJ PRI SAT-ADRESARO

Kiel ni jam informis vin, ni havas teknikajn problemojn pro kiuj la nova SAT-Adresaro ĝis nun ne aperis. Nia kamarado Floreal Gabalda, kiu respondecas pri la preparo de la Adresaro por la presejo, pro profesiaj kialoj devis foresti el Francio kaj ne havis tempon por fari tiun laboron. Fine li sendis al ni antaŭ unu monato faritan dokumenton kiu nun tute ne plu estas aktuala, ĉar intertempe okazis multaj ŝanĝoj. Do, ne valoras tuj presi ĝin, ĉar ĝi ne plu estas aktuala. Ni devas nun ĝisdatigi ĝin.
Intertempe ni regule aperigas en Sennaciulo ĉiujn informojn pri la ŝanĝoj en nia asocio, la novaliĝantojn kaj forpasintojn.
Pro manko de laborfortoj, tiu adresaro malfruas sed tuj kiam eblos, ni aperigos ĝin. Ni petas vin pri via komprenemo.


La SAT-oficejo

*KOREKTO - ADRESO DE HISPANA PERANTO*
*En la maja Sennaciulo elfalis parto de la adreso de nia hispana peranto. Ni pardonpetas kaj ripetas la bonan adreson :*

*Pedro A. Hernandez Ubeda*
*c/Candilejas, 26 - 1° izda*
*ES-28018 MADRID*
*Hispanio*

***S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)***

***SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !***




*Nova PIV aperis !*
*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# RAPORTO DE LA PLENUM-KOMITATO

## por la periodo de aŭgusto 2002 ĝis majo 2003

**Plenum-Komitato**
Post la kongreso en Alikanto la malnova P.K. devis plenumi sian rolon ĝis la referendumo kaj la elekto de la nova. K-do Jacques Bannier plenumis la rolon de la prezidanto de la P.K, post la forpaso de k-do Peyraut. Ĝis la rezultato de la referendumo la malnova P.K. plenumis diversajn kurantajn taskojn. Fine de januaro okazis kribrado de la voĉdoniloj kaj la nova P.K. estis elektita. Ĉiuj kandidatoj estis elektitaj kaj la detalaj informoj pri la rezultato aperis en la marta numero de Sennaciulo. La nova P.K. elektis inter si la prezidanton de la P.K. Estis elektita k-do Jakvo Schram. Kiel vicprezidanto estis elektita k-do Guy Cavalier. La novaj PK-anoj interkonsentis inter si pri la taskoj kiujn ili plenumos kadre de la P.K. Ĉiuj povas partopreni fizike la kunsidon en la SAT-sidejo en Parizo, sed same ĉiuj povas uzi interreton por doni sian opinion. Kutime la parizaj geamikoj venas al la sideja-kunsido kaj krome ankaŭ plenumas la fizikan laboron kiu necesas por diversaj aferoj. La neparizaj PK-anoj vigle partoprenas la debatojn pere de interreto, kiu bone funkcias danke al bona organizado.

**Deklaro de la P.K. kontraŭ la milito** - Pro la militpreparo kontraŭ Irako, la P.K. decidis fari publikan deklaron kontraŭ tiu ĉi kaj ĉiuj militoj ĝenerale. Tiu ĉi deklaro aperis frontpaĝe en la februara numero de Sennaciulo kaj ankaŭ en la TTT-paĝoj de SAT kun la subskribkampanjo kontraŭ la militoj. Multaj SAT-anoj kaj ne-SAT-anoj el la tuta mondo subskribis kaj daŭre subskribas ĝin.

**La Ondo de Esperanto** -En la revuo "La Ondo de Esperanto" aperis tre perfida artikolo pri SAT de iu nekonata "komitatano Z", kiu tre malutilas al ĝenerala Esperanto-Movado. La P.K. decidis aperigi tiun ĉi artikolon en Sennaciulo kaj invitis niajn membrojn sendi siajn reagojn al tiu gazeto.

**Nova komputilo** - Pro la paneo de la malnova komputilo kaj necerteco (granda kosto) de la sukcesa riparo, la P.K. decidis aĉeti novan komputilon kaj peti al niaj membroj financan subtenon por tiu aĉeto. La nova komputilo jam estas aĉetita kaj tiu ĉi raporto jam estas tajpita per ĝi. Kelkaj gekamaradoj jam sendis sian subtenon al tiu celo. Dankon al ĉiuj.

**Eŭropa Sociala Forumo (E.S.F.)** - Fine de la jaro (12-16.11.2003) okazos en Parizo, Saint-Denis, Eŭropa Sociala Forumo. La P.K. de SAT decidis ke SAT aliĝu al tiu evento kaj invitas ĉiujn niajn membrojn aktive partopreni kadre de SAT.

### Membraro
Kiel ĉiujare ni povas konstati kun bedaŭro ke pluraj malnovaj fidelaj gekamaradoj forlasis nin pro forpaso kaj ke ne multaj novaj alvenas. La nova P.K. decidis pristudi tiun gravan problemon, prezenti ĝin al la kongreso en Ĉaŭdefono kaj serĉi la solvon. Ni ĉiuj konscias ke la problemo estas tre grava sed ni estu optimistaj kaj agu en tiu senco. Nia neneŭtrala asocio donas al multaj esperantistoj kiuj ne deziras nur babili pri la lingvo kaj lingvaj problemoj, eblecon agi politike, ekologie ktp, uzante nian komunan sennaciecan lingvon. Nia asocio estas malfermita al ĉiuj kiuj kredas ke la pli bona Mondo estas ebla. Ni invitas ĉiujn niajn membrojn klarigi tion al siaj esperantistaj geamikoj kiuj ankoraŭ ne konas SAT. Ili venu kaj konvinkiĝu pri la demokrateca kaj progresema karaktero de SAT, kie ne gravas etno, civitaneco, haŭtkoloro, lingvo, kredo, kulturo. Ĉiuj estas bonvenaj kaj ĉiuj kune ni faros "unu homan rondon familian".

### Administrado
Neniu ŝanĝo okazis en la administrejo de SAT. K-do Barkoviĉ daŭre zorgas pri sekretariado, ĝenerala sekretariado kaj pri ĉiuj oficejaj laboroj. Nia kasistino, k-dino Sabatier daŭre venas unufoje semajne por prizorgi la kasajn kaj kontadajn taskojn. K-do Bannier kun la edzino daŭre zorgas pri la ekspedo de Sennaciulo kaj S.R.

### Kasa raporto - jaro 2002
### aperos en julia numero

### Rilatoj kun LEA-oj
Niaj rilatoj kun la LEA-oj estas daŭre bonaj. Bedaŭrinde, la problemo pri HALE (Hispana LEA) montriĝis grava. Tiu asocio ne prezentis sin al la lasta LEA-komitato en Alikanto, kiun tamen partoprenis pluraj junaj hispanaj kamaradoj kaj kiuj plendis pri la agado de HALE. Anstataŭ propagandi SAT en la hispanaj medioj, ĝi daŭre en sia organo "Kajeroj el al Sudo" akre kritikis SAT. Krome, ĝi eĉ malfermis siajn kolumnojn al falangisto, kio estas absolute kontraŭa al la ideoj kaj celoj de SAT. Pro la malkontento kaj neakcepto, la plej multaj membroj de HALE forlasis ĝin kaj kreis novan maldekstran asocion SATEH kiu deziras aliĝi al LEA-komitato anstataŭ HALE. Tiun problemon traktos LEA-komitato en Ĉaŭdefono.
Ni daŭre invitas ĉiujn LEA-ojn bone klarigi al siaj membroj kaj novaj esperantistoj en siaj lingva teritorioj, kia estas la diferenco inter LEA kaj SAT. La dua tasko de la LEA post la diskonigado de Esperanto estas varbado de novaj membroj al SAT.

### Rilatoj kun TANEF
Tre bonaj rilatoj kun tiu asocio daŭras. Ĉi-jare (en 2003) okazos denove antaŭkongreso organizata de TANEF.